# NIA PONTO


Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
J.Miguel García Iturrioz
(jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna: 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**OKTOBRO/DECEMBRO 2018** **Nro. 117 (4/18)**




## INTERNACIA ESPERANTO-TAGO.

La 15an de decembro, naskiĝtago de la kreinto de Esperanto, oni celebras la Internacian Esperanto-Tagon, ankaŭ konata kiel *Zamenhof-Tago*. Ludwik Lejzer Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en la nuna pola urbo Białystok kaj mortis, 57-jara, en Varsovio, la 14-an de aprilo 1917, kiam ankoraŭ unu el la plej stultaj kaj sangavidaj militoj, la unua mondmilito, ruinigis Eŭropon.

## El "día de Zamenhof" en el Grupo Esperantista de Bilbao.

Como ya es tradicional, nos reuniremos en el Grupo para celebrar este "día internacional del Esperanto" y aprovecharemos para reunirnos con amigos a los que, por desgracia, sólo vemos por el Grupo en este día.

Tras una breve charla, nos reuniremos alrededor de una mesa para dar buena cuenta de la comida y bebidas aportadas por los participantes.

**Día: Sábado 15 de Diciembre**.
**Hora: 19:30**.

LOKE ...

## ĜENERALA KUNVENO DE LA 18-a DE MAJO.

Kiel anoncite, la pasintan 18an de majo ni okazigis la ĉiujaran ĝeneralan kunvenon de nia rondo. Inter aliaj aferoj, oni aprobis

1. Starigon de nova jarkotizo por gejunuloj ĝis 30 jaroj. Ili pagos nur 20 eŭrojn.

2. Nomumi honoran prezidanton de la Grupo al nia kara kaj entuziasma amiko Eduardo Larrouy, jam 105-jara.

3. Danki la grandan laboron, kiun efektivigis la gvidanto de la lastaj kursoj, David Redondo, ne nur kiel instruisto, sed ankau kiel elstara propagandisto de la Internacia Lingvo.

4. Partan renovigon de la estraro. Sur la foto videblas la nunajn estraranojn.



Estraranoj de la Grupo (ekde maldekstre kaj supre): Octavio Gutiérrez (voĉdonanto), Jesús M. García (secretario), David Redondo (vicprezidanto), Teodoro Ibáñez (voĉdonanto), Iciar Arteche (kasistino) kaj Paco López (prezidanto).

# LA KRISTNASKA LOTERIO, JAM AĈETEBLA.




Tiel kiel ni anoncis en la pasinta "Nia Ponto", jam eblas aĉeti la tradiciajn kristnaskajn loterikvitancojn de la Grupo, presitaj tute en Esperanto.

La ĉi-jara numero estas tiu, kiu videblas sur la apuda bildo, t.e., la numero **96.201**. Ĉiu bileto kostas 5 €, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

Je la sendo de tiu-ĉi "Nia Ponto" preskaŭ ne restas biletoj, do rapidiĝu por aĉeti ilin (ne estas ŝerco).

**Kaj memoru ke ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto**:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la biletojn per retpoŝto.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.

# AŬDVIDA RAPORTO.



Tiun-ĉi vendredon, la 16-an de novembro, venis en nian sidejon grupo de studentoj pri aŭdvida telekomunikado.
Ili filmis kaj sonregistris intervjuon al la gvidanto de la nuna meznivela kurso de Esperanto, kune kun liaj gelernantoj.
Ili ankaŭ intervjuis la prezidanton de la Grupo.
Pli poste eblos ke ni vidu tiun raporton.

*(El la TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao. 16/11/2018)*

# CUOTAS DEL AÑO 2018.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una "X", es que **te has olvidado de hacer el pago de la cuota de socio de este año**. El número de cuenta, donde hacer el ingreso, está en la primera página de este "Nia Ponto" y las cuotas vigentes son:

| | |
|---|---|
| Cuota normal individual: | 60,00 € anuales. (5 € al mes) |
| Cuota familiar: | 70,00 € anuales. (5,83 € al mes) |
| Cuota joven (Hasta 30 años): | 20,00 € anuales. (1,66 € al mes) |

## LA VENONTA HISPANA KONGRESO …

Okazos en la urbo **Malago** de la **1-a ĝis la 5-a de majo 2019**, parte kune kun la congreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio), kiu disvolviĝos de la 3-a ĝis la 9-a.

Jam eblas aliĝi. La kongresa retpaĝo estas:

https://esperanto-andalucia.info

## NOVA GRUPO DE ESPERANTO EN FUENLABRADO.

La 16an de oktobro prezentiĝis nova grupo de Esperanto en la urbo Fuenlabrado (Fuenlabrada, ducentmilhoma urbo en la ĉirkaŭo de Madrido), kaj la kurso kiun ĝi organizos dum la nuna akademia jaro. En la prezento partoprenis la prezidantoj de Madrida Esperanto-Liceo kaj de Hispana Esperanto-Federacio.

La grupo, nomata Fuenlabrada Esperanto-Ligo, naskiĝis post la kurso komenciĝinta la pasintan jaron en la oficiala Lingvolernejo, kaj estas prezidata de la aktuala vicurbestro kaj urbkonsilisto pri edukado de la municipo, Isidoro Ortega.

Pri la prezento kaj la kurso informis la sudmadrida stacio de la radio Cadena SER kaj la loka retportalo Fuenlabrada-noticias.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 50. Okt. 2018)*

## ANTAŬENIRAS LA PRETIGO DE LA DUOBLA KONGRESO DE MALAGO .

Post la sukceso de la renkontoj de Esperanto dum tiu ĉi somero en la Iberia Duoninsulo, ni jam ekpretigas la novajn eventojn por la jaro 2019. Konkrete, la 78a Hispana Kongreso de Esperanto disvolviĝos en Malago, komence de majo, kaj estos ankaŭ speciala, ĉar ĝi profitos la okazigon de internacia faka renkonto, kaj ni atendas la ĉeeston de multnombraj esperantistoj el aliaj landoj. Nome, la hispana Kongreso okazos inter la 1a kaj 5a de majo, parte koincide kun la Kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, kiu celebriĝos inter la 3a kaj 9a de majo.

La unuaj informoj, inklude de la loko, la unua skemo de la programoj kaj la aliĝkondiĉoj, estas konsulteblaj en la retejo de la Andaluza Esperanto-Unuiĝo, ĉefa organizanto de la renkonto.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 50. Okt. 2018)*

## ENCUENTRO DE JÓVENES EN EL PUENTE DE DICIEMBRE.

La gejunuloj de HEJS (Hispana Esperantista Junulara Sekcio) organizos neformalan renkontiĝon la “ponton” de decembro sub la nomo “Benkontiĝo”. Inter la 6-a kaj 8-a de decembro en la “Albergue Juvenil Richard Schirrmann”, en la “Casa de Campo” de Madrido. Por pliaj informoj kaj aliĝoj, skribu al hejs@esperanto.es aŭ vizitu la sociajn retojn (Facebook, Twitter aŭ Instagram).

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 51. Novembro 2018)*

# KIAL NE FARIĜI MEMBRO DE HEF POR 2019?

Alvenas fino de jaro kaj komenco de alia nova. Ĉu vi ne emus aliĝi al HEF (Hispana E-Federacio) por 2019?.

HEF estas la ĉefa organizo kiu laboras en la tuta Hispanio por antaŭenigi Esperanton, sed sen la helpo de ni ĉiuj, ĝi certe ne ekzistus. Tiu via helpo estas bezonata kaj HEF atendas vin. Krome, en la lasta Ĝenerala Kunveno, oni aprobis novajn kotizojn kun rabato interalie por junuloj.

Kaj tiuj kotizoj, jam sufiĉe malaltaj, eĉ havas **fiskan avantaĝon**. Ĉi-tie, **en Bizkajo, 20%** de la kotizo estas redonita kiam oni devas fari la impostan deklaron.

Jen la kotizoj al HEF por 2019:

- Individua membro, ordinara kotizo / Socio individual, cuota ordinaria (32€)
- Individua membro, senpapera kotizo* / Socio individual, cuota sin papel* (30€)
- Rabatita kotizo ** / Cuota reducida** (20€)
- Rabatita kotizo: junuloj (< 30 jaroj) *** / Cuota reducida: jóvenes (< 30 años) *** (20€ / 10€)
- Protektanta membro / Socio protector (64€)
- Kolektiva membro**** / Socio colectivo **** (64€)

Rimarkoj pri la kategorioj / Aclaraciones sobre las categorías:

(*) Speciala kotizo por anoj kiuj ne deziras ricevi la bultenon en papera formo kaj preferas ricevi ĉiujn komunikojn nur per elektronikaj rimedoj.

(**) Speciala kotizo por senlaboruloj aŭ aliaj personoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj; intertraktu kun la estraro de HEF por diskuti la detalojn.

(***) La anoj malpli ol 30-jaraĝaj estas aŭtomate membroj de la junulara sekcio HEJS. Se ili estas krome membroj de klubo aŭ asocio kolektiva membro de la Federacio, ili pagas **duonon de la rabatita kotizo**. **La E-Grupo de Bilbao estas unu el tiaj asocioj**.

(****) Ne pagas kotizon la kolektivaj membroj (Asocioj) kun malpli ol 10 anoj, du el kiuj estas individuaj membroj de HEF.

Ĉiuj membroj ricevas la asocian bultenon ("Boletín"), 4 numerojn jare. Membroj kun rabatitaj kotizoj ricevas la bultenon nur en elektronika versio.

Pliajn informojn vi ricevos en la Grupo de Bilbao aŭ en la jenaj adresoj:

http://www.esperanto.es/hef/ (hispane)
http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco (Esperante)

**Memoru: la gejunuloj malpli ol 30 jaraĝaj, kiuj estas membroj de la E-Grupo de Bilbao, povas aliĝi al HEF pagante nur 10 eŭrojn/jare. Aliĝu al HEF**.

**Kaj ne forgesu ke la E-Grupo de Bilbao havas propran TTT-ejon (página web):**
**https://sites.google.com/site/esperantobi/home**

# TRA LA MONDO …

## STATISTIKOJ PRI LINGVOJ EN EŬROPO.

Okaze de la ĉi-jara Eŭropa tago de lingvoj (la 26-a de septembro) la Konsilio de Eŭropo aperigis informojn pri statistikojpri lingvoj en Eŭropo. Inter la datumoj estas la jenaj:

65% de eŭropanoj parolas minimume unu fremdlingvon. Unuan pozicion tiusence havas Svedio kun 97%, sekvas Latvio, Danlando kaj Litovio kun 96%, Luksemburgo (95%), Finlando kaj Malto kun 92% kaj Estonio kun 91%.

Britio estas en la lasta pozicio kie 65% parolas neniun lingvon, Antaŭlasta estas Rumanio kie 64% parolas neniun fremdlingvon, en Bosnio kaj Hercegovino tiu procento estas 61%, en Albanio 60% kaj en Hungario 58%. Kompreneble tiu statistiko estas duba ĉar ja temas pri enketo en kiu la civitanoj mem decidas kiom da fremdlingvoj ili konas kaj kutime tio estas troigitaj ciferoj, aparte konsiderante ke individuoj tre subjektive taksas sian scion.

Se oni rigardas la plej altajn ciferojn, ŝajnas al mi ke nur la skandinavoj vere estas rekorduloj dank'al ilia lerneja sistemo kaj riĉeco, sed aliaj profitis de iamaj mastroj kiuj regis ilin. Baltaj landoj havas altajn ciferojn ĉar ili bone parolas la rusan kiun ili devis lerni en la tempo de Sovetunio kaj ĉar ankoraŭ tie vivas multaj rusoj. Slovenio estas rekordulo kun homoj kiuj parolas tri aŭ pli da lingvoj dank'al tio ke ili turismas ofte al Kroatio kaj konas la kroatan, multaj konas la najbaran germanan kaj ili diligente lernas ne nur en lernejoj la anglan. Simpla konstato: Tiuj kiuj havis dum longa periodo mastrojn, tiuj profitis de tio, almenaŭ lingve

*(Zlatko Tišljar. "Eŭropa Bulteno". 09/2018)*

## DU PRELEGOJ PRI E-HISTORIO EN MADRIDO.

Dum la lasta semajno de novembro estas programitaj en Madrido du prelegoj, hispanlingvaj, pri du malsamaj aspektoj de la historio de Esperanto.

La lundon 26an, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, **José Antonio del Barrio**, prelegos pri "Esperanto, en la Dua Respubliko, en prizono kaj en ekzilo", laŭ invito de la Asocio de Idoj de la Hispana Ekzilo. La evento okazos ĉe la universitato UNED, en la sidejo nomata Escuelas Pías, historia konstruaĵo en strato Tribulete, 14.

La ĵaŭdon 29an de novembro, profesoro **Roberto Garvía**, de la Universitato Carlos III, parolados pri "Katolikismo kaj Esperanto; konverĝoj", sine de seminario "Tito Brandsma, atestanto de espero", dediĉita al tiu nederlanda karmelitano, esperantista, murdita de la nazioj kaj beatigita de la katolika Eklezio.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 51. Novembro 2018)*

## LA VENONTA UK OKAZOS EN FINLANDO.

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto (20-27 de julio 2019) okazos en la finnlanda urbo Lahtio (Lahti).
Organizas: Universala Esperanto-Asocio.
Retadreso: kongresoj@co.uea.org

# ESPERANTO KAJ POLITIKO.

Esperanto-movado dum sia tuta historio klopodis kontakti politikistojn je ĉiuj niveloj komprenante ke sen ilia subteno ne eblas serioza antaŭenmarŝo en la socio. Fojfoje estis sukcesa tia kontaktado, fojfoje okazis ke iu esperantisto iĝis grava politikisto kaj multaj esperoj estis ligitaj al tiaj personoj (siatempe aŭstra ŝtatprezidanto Franz Jonas kaj jugoslavia prezidanto Josip Broz Tito). Tamen el tiuj plej superaj rilatoj en fina konsekvenco restis nenio. Montriĝis ke individua subteno de unuopuloj je superaj pozicioj neniel sufiĉis pro manko de relative amasa subteno de politikaj fortoj (aŭ la voĉdonanta popolo aŭ almenaŭ kelkaj fortaj partioj).

UEA havis en sia strategio rilatojn al Unuiĝintaj Nacioj kaj atingis dufoje gravajn politikajn agnoskojn (la unua kaj dua deklaracio de UNESCO subtene al E-movado) sed pli ol tio estas iluzie eĉ pensi.

Je la nivelo de unuopaj ŝtatoj oni atingis similajn rezultojn kiel la sukceso de poloj antaŭ kelkaj jaroj kiam la Pola E-kulturo estis proklamita ŝtatnivele nacia pola kulturheredaĵo. Indiividuaj personaj kontaktoj havis lokajn kaj tempolimigitajn sukcesojn kiel ekz. fruktodona kunlaboro inter Kroatia E-movado kaj Nikola Šegota, tiama vicprezidanto de Kroata parlamento – kiu kontribuis al akcepto de leĝo ene de kiu KEL estis regule financata de la Kroata Loterio dum deko da jaroj aŭ kontaktoj kun Čaplovič, vicprezidanto de tiama Slovakio kiu subtenis okazigon de grava konferfenco pri lingva problemo en Slovakio kaj sendis leteron al registaroj de ĉiuj EU-landoj petante subtenon al konkludoj de tiu konferenco aŭ kontaktoj kun Ljudmila Novak, eŭropa parlamentanino, kiu organizis ekspozicion pri Esperanto en Eŭropa Parlementejo en Bruselo kaj petis diskuton pri E en Komisiono por kulturo de Eŭropa Parlemanto. Estis sufiĉe multaj okazoj kiam altaj ŝtataj funkciuloj partoprenis en gravaj E-aranĝoj, ĉefe UK-oj kaj salutis la kongresojn kaj la laboron de Esperantistoj. Kaj fine en la lasta mandato de Eŭropa Komisiono (la plej supera organo de EU) EEU sukcesis interesigi ties komisionanon Vytenis Andriukaitis ekagi por Esperanto. Ni celis sukcesi per li interesigi la Eŭropan Komsilion pri edukado pri uzo de E en propedeŭtika funkcio en eŭropaj lernejoj. Badaŭrinde mankas tempo, ĉar lia mandato finiĝas post malpli ol unu jaro kaj la klopodoj efikis tro malrapide. Tamen ankoraŭ restas iom da espero.

En la politika agado lastatempe ekzistas kelkaj ekzemploj unikaj: klopodo atingi politikan subtenom en la amasoj. Tiusence fondiĝis antaŭ deko da jaroj unua politika partio kiu celas batali por Esperanto kaj demokratio: EDE. Ĝi jam partoprenis en du eŭropaj balotoj kaj pretigas sin por la tria en printempo 2019. Dum la unuaj du balotoj ĝi sukcesis aktivi nur en Francio kaj Germanio kaj en Francio atingis 30.000 voĉojn (ĉirkaŭ 0,03% de la voĉdonantoj) kio ne estas granda rezulto sed konsiderante tion ke ĝi aktivis nur en unu lando tio estas bona rezulto. Se EDE havus siajn sekciojn en almenaŭ 15 plej fortaj EU-landoj, ĝi gajnus preskaŭ duonmilionon da voĉoj kaj pri tio la politikistoj nepovus silenti.

Tamen ankaŭ tiel –EDE decidis plu partopreni, ĉar tio ebligas al ili disdoni informojn pri EDE kaj Esperanto al centmiloj da francaj civitanoj, kio estas per si mem grava sukceso.

Alia internacia organizaĵo kiu havas politikan karakteron estas AVE (Asocio de verdaj esperantistoj), kiu ne agas kiel partio, sed grupigas esperantistojn interesitajn pri verda politiko kaj kunlaboras kun verdaj partioj en kelkaj landoj.

*(Zlatko Tišljar. “Eŭropa Bulteno”. Okt. 2018. Nro. 185)*

## S.A.T.-KONGRESO EN BARCELONO. 4-11 aŭgusto 2019.




Daŭrigas la serio de internaciaj kongresoj en Hispanio: la venontan jaron 2019, krom la kongreso de la fervojistoj de IFEF en Malago, kune kun la hispana congreso, en aŭgusto okazos en Barcelono la congreso de S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda).
Pliajn informojn kaj aliĝilon vi trovos en:
http://www.satesperanto.org/spip.php?rubrique631



## NOVA ESTRARO DE TEJO.




Dum la Internacia Junulara Kongreso, okazinta de la 4-a ĝis la 11-a de Aŭgusto, en Badajoz (Hispanujo), elektiĝis la nova estraro de TEJO por la dujaro 2018-2019. Jen la direktoraro:

Prezidanto: Tran Hoan (Ĝojo), el Vjetnamujo
Vicprezidanto 1: Léon Kamenický, el Slovakujo
Vicprezidanto 2: Francesco Maurelli, el Germanujo
Ĝenerala Sekretario: Konstanze Schönfeld (Tuŝka), el Germanujo
Kasisto: Mung Bui (Feliĉa), el Vjetnamujo
Estrarano: Hans Becklin (Hanso), el Usono
Estrarano: Arturo Crespo, el Kolombio
Estrarano: Kingslim Edah, el Benino
Estrarano: Olga Sevcenco, el Moldavujo

**LA "GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO" TUTKORE DEZIRAS, AL LA TUTA HOMARO, TRE SUKCESAN KAJ FRUKTODONAN JARON 2019-AN.**